POR NIAJ INFANOJ

EDMONDO DE AMICIS

ITALAJ RAKONTOJ

PAOLET - S.VITO AL TAGLIAMENTO
ITALIA

POR NIAJ INFANOJ

EDMONDO DE AMICIS

ITALAJ RAKONTOI

ESPERANTEN TRADUKITAJ EL ITALA TEKSTO

de

D-ro P. C. MONTI

DUA ELDONO

A. PAOLET - S. VITO AL TAGLIAMENTO (ITALIA)

ANTAŬPAROLO
DE LA UNUA ELDONO

EDMONDO DE AMICIS *(1846-1908) jam estas konata en la esperanta literaturo, dank' al du belaj tradukaĵoj de S-ino Junck. Malfeliĉe tie ĉi ni ne povas diri pri li pli ol kelkaj vortoj, nesufiĉaj por montri la gravecon de tiu ĉi verkisto en la itala literaturo.*

Jam de la junaĝo li verkis artikolojn kaj novelojn ŝatindajn pro noblaj sentoj, pro pureco kaj ĉarmeco de arto lia tute natura.

Lia oficira vivo inspiris al li Bozzetti Militari.

La impresojn pri longaj vojaĝoj li publikigis per famekonataj libroj: Sull' Oceano, Olanda, Parigi, Londra, Spagna, Costantinopoli, Marocco, *k.t.p. Sed maloftan sukcesegon havis lia libro por geknaboj* Cuore *(Koro). Pli ol 300.000 ekzempleroj disvendiĝis dum malmultaj jaroj; ĝi tradukiĝis en ĉirkaŭ 20 lingvojn.*

La ses rakontoj — kiujn ni publikigas laŭ ĝentila permesrajto de la milanaj eldonistoj FRATOJ TREVES *— estas eltiritaj el* Cuore.

Ni estas certaj, ke la tutmonda esperantista legantaro bonakceptos tiun eldonaĵon, kiu havas du precipajn meritojn: 1e esti elokventa kaj realeca pentraĵo de l' karaktero de l' itala popolo; kaj 2e montri ekzemplon de la lernejaj libroj, per kiuj tiu popolo edukiĝas kaj morale evoluadas.

Milano, 1922



LA ETA PATRIOTO EL PADOVA

Mi ne estos soldato malkuraĝa, ne: sed mi irus multe pli volonte lernejen, se nia instruisto farus ĉiutage rakonton kiel hodiaŭ matene. Li diris, ke ĉiumonate li faros tion: ke li donos al ni kopion de l' rakonto, kiu, ĉiel, pritraktos pri ago bela kaj vere farita de knabo. Tiu ĉi titoliĝas: « Le eta patrioto el Padova ». Jen ĝi:

Franca vaporŝipo levis la ankrojn de Barcelono, en Hispanujo, Genova' n. Kunvojaĝis Francoj, Italoj, Hispanoj kaj Svisoj. Inter aliaj estis dekunujara knabo, malbone vestita, solestarema kiel sovaĝa besto kaj rigardanta ĉiujn severokule. Kaj tute li pravis severokule rigardadi ĉiujn. Antaŭ du jaroj liaj gepatroj, laboristoj de l' ĉirkaŭaĵo de Padova, vendis lin al ĵonglistestro, kiu per pugnobatoj kaj piedfrapoj igis lin ĵonglisto, kaj kondukis lin tra Francujo kaj Hispanujo, batante ĉiam, sed

neniam satigante la malfeliĉulon. Fine, en Barcelono, ne povante plu toleri la batojn kaj la malsaton, en kompatindega stato, tiu ĉi sukcesis forflugi de sia turmentisto kaj alkuri por protekto ĉe l' Italan Konsulon, kiu kompateme enŝipigis lin sur tiun ŝipon, doninte al li leteron por la policestro de Genova, kiu devis lin realveturigi hejmen: al la gepatroj, kiuj estis lin vendintaj kiel beston. La mizera knabo estis kun vestoj disŝiritaj kaj malsaneta. Oni asignis al li duaklasan kajuton. Ĉiuj rigardis lin; iu lin aldemandis; sed li ne respondis, kaj ŝajnis malami kaj malŝati ĉiujn, tiel malbonigita de la senigoj kaj de la batoj.

Tamen tri kunvojaĝantoj, insistinte per demandoj, sukcesis malfermigi al li la buŝon: kaj tiam li per malmulte da krudaj vortoj, iom francaj, iom hispanaj, rakontis sian historion. Italoj ne estis la tri konvojaĝantoj: tamen ili komprenis kaj ĉu pro kompatemo ĉu pro ebrieteco donacis al li monerojn. Tiumomente sinjorinoj eniris la salonon, kaj ĉiuj la tri afekte donacis al li aliajn monerojn kriante: — Prenu tiun! — Prenu ankaŭ tion! — resonigante la monerojn sur la tablo. La knabo enpoŝigis ĉion,

dankante duonvoĉe, iom malafabla kiel kutime, sed per rigardo unuafoje rideta kaj ama. Poste li suprengrimpis sian kajuton, tiris la antaŭkurtenon kaj ekpensadis pri si. Per tiu mono li ja povos gustumi bonajn manĝaĵetojn sur la ŝipo — post dujara malsatado: aŭ aĉeti jaketon ĵus elŝipiĝinta en Genova — post dujara ĉifonvestado; aŭ, fine, porti ĝin hejmen kaj tiel esti akceptata de siaj gepatroj iom pli afable ol kun malplenaj poŝoj. Tiu mono estis por li malgranda trezoro. Tion li pensis malantaŭ la kurteno dum la tri kunvojaĝantoj meze de l' duaklasa salono babiladis ĉirkaŭ la manĝotablo. Ili trinkadis kaj babiladis pri vojaĝoj, pri de ili konataj landoj, kaj okaze ili ekparolis pri Italujo. Unu ekplendis pri la hoteloj, alia pri la fervojoj, poste ĉiuj varmiĝintaj parolis malbone pri ĉio. Unu estis pli volonte travojaĝonta Laponujon. Dua diris, ke en Italujo li trovis nur trompistojn kaj rabistojn. Tria, ke la italaj oficistoj ne scias eĉ legi. — Popolo nescianta — rediris la unua. — Malpura, — aldonis la dua. — Ŝte... — ekkriis la tria: li intencis diri *ŝtelema*, sed la vorton li ne povis fini: hajlado da moneroj grandaj kaj malgrandaj falis sur

iliajn kapojn kaj ŝultrojn, saltetante poste sur la tablo kaj sur la planko bruege. Ĉiuj leviĝis, furioze rigardante supren, kaj ili ricevis alian plenmanon da moneroj en la vizaĝo. — Reprenu vian monon, — ekkriis malestime la knabo, sin prezentinte el la kurteno de l' kajuto: — Mi ne akceptas almozon de kiu insultas mian patrujon!

***

LA MALGRANDA VIDDEĴORANTO LOMBARDA

En 1859, dum la militado por la liberigo de Lombardio, kelke da tagoj post la batalo de Solferino kaj S. Martino venkita de l' Franco-Italoj kontraŭ la Aŭstroj, belan matenon de junio eskadrono da Saluzzo-kavalerianoj malrapide rajdadis sur vojeto senhoma kontraŭ la malamikojn, atente esplorante la kamparon. Estrumis oficiro kaj serĝento kaj ĉiuj rigardadis malproksimen antaŭe per fiksaj okuloj, senparole, atende ekvidi kiam ajn la blankajn uniformojn de l' aŭstraj antaŭpostenuloj. Ili alvenis tiel ĉe kampodomo ĉirkaŭata per fraksenoj, antaŭ kiu staris sole dekdujara knabo, senŝeligante branĉeton per tranĉilo por fari al si bastonon: el fenestro pendis larĝa standardo trikolora; interne estis neniu; la kampuloj, elpendiginte la standardon, forkuris pro timo de l' Aŭstroj. Ekvidante la kavalerianojn, la knabo forĵetis la bastonon kaj salutis per sia ĉapo. Li estis bela

knabo kun kuraĝa vizaĝo, okuloj grandaj kaj bluaj, haroj longaj kaj blondaj, sen jako kaj kun malkovrata brusto.

— Kion vi faras tie ĉi? — demandis lin la oficiro, haltante sur sia ĉevalo. — Kial vi ne forkuris kun via familio?

— Mi ne havas familion, respondis la knabo. — Mi estas trovitulo, kiu laboras iom por ĉiuj. Mi restis ĉi tie por vidi la militon.

— Ĉu vi vidis Aŭstrojn trapasi?

— Ne, de post tri tagoj.

La oficiro restis pripense kelkajn minutojn. Poste elseliĝis kaj, lasinte tie la soldatojn rigardantajn al la malamikaro, eniris la domon kaj supreniris la tegmenton.

La domo estis malalta; el ĝia tegmento nur oni vidis la proksiman parton de l' kamparo. — Estas necese suprengrimpi arbon, li diris, kaj malsuprevenis. Ĝuste antaŭ la draŝejo leviĝis altega kaj maldika frakseno, kiu svingis sian pinton en la bluaĵo. La oficiro staris iom pripensa rigardante jen la arbojn jen la soldatojn; subite li demandis la knabon:

— He, petolulo, ĉu vi vidas malproksimen?

— Mi? — respondis la knabo. — Mi vidas paseron je unu mejlo.

— Ĉu vi povus suprengrimpi tiun ĉi arbon?

— Tiun ĉi arbon? Mi?... Duonminute, jen.

— Kaj vi scius diri al mi tion, kion vi vidos el tie: ĉu estas aŭstraj soldatoj tiuflanke aŭ polvonuboj aŭ briletaj pafiloj aŭ ĉevaloj?

— Certe mi scius....

— Kion vi postulas?

— Kion? — diris la knabo ridetante. — Nenion mi pretendas. Ha! Estas tiel facile. Rigardu.... Se tio estus por la tedeskoj *(germanaŭstroj)* neniam, sed por la niaj!... Mi estas lombardo.

— Bone. Suprengrimpu, do.

— Unu minuton: mi min senŝuigas.

Li sin senŝuigis, streĉis sian pantalonrimenon, ĵetis ĉapon sur la herbejon kaj ĉirkaŭprenis la fraksentrunkon.

— Sed atentu, — diris la oficiro, subite haltigante lin kvazaŭ time.

La knabo turnis al li siajn helajn okulojn bluajn demande.

— Nenio, — diris la oficiro; — suprengrimpu.

La knabo suprengrimpis kiel kato.

— Rigardu antaŭen, — kriis la oficiro al la soldatoj.

Baldaŭ la knabo atingis la pinton de l' arbo, kaŝata de l' foliaĵo krom la brusto, sur kiu kaj sur la blonda kapo reflektiĝis orumanta la suno. La oficiro penis vidi lin pro l' alteco de l' frakseno.

— Rigardu rekte malproksimen, — li kriis al li.

La knabo por vidi pli bone disigis sian dekstran manon de l' trunko kaj aligis ĝin je l' frunton.

— Kion vi vidas? — demandis la oficiro.

La knabo klinis la vizaĝon kaj, metinte ĉe l' buŝo manon kiel paroltubon, respondis:

— Du rajdantojn sur la strato blanka.

— Kiom malproksime?

— Duonmejle.

— Ĉu ili moviĝas?

— Ili haltis.

— Kion alian vi vidas? -- demandis la oficiro post iom da silento. — Rigardu dekstren.

La knabo rigardis dekstren.

Poste li diris:

— Ĉe l' tombejo inter la arboj estas io brileta. Ŝajnas bajonetoj.

— Ĉu ne homoj?

— Ne, eble ili estas kaŝataj meze de l' tritiko. — Tiumomente akrega kuglofajfo trapasis alte l' aeron kaj mortis malproksime malantaŭ la domo.

— Malsupren, knabo! — kriis la oficiro. — Ili vidis vin. Mi nenion alian bezonas. Venu malsupren.

— Mi ne timas, — respondis la knabo.

— Malsupren.... — rekriis la oficiro. — Kion vi vidas maldekstre?

— Ĉu vi diris maldekstre?

— Jes, maldekstre.

La knabo turnis sin maldekstren: tiam alia fajfo pli akra kaj malalta fendis la aeron. La knabo ektremegis. — Pro l' diablo! li ekkriis, min ili celas! — La kuglo traflugis tute proksime.

— Malsupren! — kriis la oficiro komande kaj ekscitite.

— Mi tuj venas, — respondis la knabo.— Sed la arbo ŝirmas min, ne timu. Maldekstre, ĉu ne?

— Maldekstre — respondis la oficiro, — sed venu malsupren.

— Maldekstre, — kriis la knabo, elpendigante la tutan bruston tiuflanken, — kie estas kapelo ŝajnas al mi vidi....

Tria fajfo pli kolera alte traflugis kaj samtempe oni vidis la knabon malsuprenveni falegante kun la kapo malsupre.

— Malbeno! — kriis la oficiro, alkurante.

La knabo falis teren dorsen kaj restis tiel kun malfermitaj brakoj; sangorivereto elfluis el brusto lia, maldekstre. La serĝento kaj du soldatoj elseliĝis; la oficiro kliniĝis kaj malfermis lian ĉemizon: la kuglo estis trafinta lian maldekstran pulmon.

— Mortinta! — ekkriis la oficiro.

— Ne, li vivas! — diris la sarĝento. — Ha! malfeliĉa knabo. Brava knabo! — kriis la oficiro. — Ne timu! Ne timu! — Sed dum li lin kuraĝigis kaj surpremis per poŝtuko lian vundon, la knabo movetis la palpebrojn, lia kapo falis malantaŭen: li estis mortinta. La oficiro paliĝis kaj rigardis lin iomete; poste kuŝigis lin sur la herbejo; leviĝis, kaj rigardadis lin; ankaŭ la serĝento kaj la du soldatoj rigardis lin senmovaj; la aliaj estis turnitaj kontraŭ la malamikaro.

— Malfeliĉa knabo! — ripetis melankolie la oficiro. — Malfeliĉa kaj kuraĝa knabo!

Poste li alproksimiĝis al la domo, deprenis de l' fenestro la flagon trikoloran kaj sternis ĝin kiel funebran drapon sur la mortinteto, lasante lian vizaĝon malkovrita. La serĝento kunigis apude ŝuojn, ĉapon, bastoneton kaj tranĉilon.

Ili staradis ankoraŭ iom silente; poste la oficiro diris al la serĝento: — Ni forveturigos lin per la militista ambulanco: li mortis kiel soldato, la soldatoj entombigos lin. — Dirinte tion li ĵetis kison al la mortinto per la mano, kaj komandis: Selen! — Ĉiuj saltis selen kaj la eskadrono forrajdis.

Sed post kelkaj horoj la mortinta knabo ricevis siajn militistajn honoraĵojn.

Je l' sunsubiro la tuta linio de niaj antaŭpostenoj antaŭeniris kontraŭ la malamikaron, kaj sur la vojeto trairita matene de l' eskadrono, marŝadis duoble nombroriĉa bataliono da bersalieroj, kiu antaŭ kelkaj tagoj estis venkinta ĉe S. Martino. La soldatoj jam sciis pri la morto de l' knabo antaŭ la ekmarŝado. La vojeto, flankumanta rivereton, pasis apud la domo.

Kiam la unuaj oficiroj de l' bataliono vidis la malgrandan kadavron kuŝantan ĉe l' frakseno kaj kovritan per trikolora flago, salutis lin per la sabro; alia oficiro deprenis du florojn ĉe l' rivereto florumata kaj ĵetis ilin al li. Tiam ĉiuj trapasantaj bersalieroj deprenis florojn kaj ilin ĵetadis al la mortinto. Post iom da tempo la knabo estis tute kovrita per floroj, kaj oficiroj kaj soldatoj ĉiuj faris al li saluton: — Brava Lombardeto! Adiaŭ, knabo! Al vi, blondulo! Vivu! Gloron! Adiau! — Oficiro ĵetis al li sian medalon je l' braveco, alia iris kisi lian frunton. Dume la floroj pluvadis sur la nudajn piedojn, sur la sangan bruston, sur la kapon blondan.

Kaj li dormadis tie sur la herbejo envolvita per sia flago, kun la vizaĝo blanka kvazaŭ rideta, malfeliĉa knabo! kvazaŭ se li aŭdus tiajn salutojn kaj ĝojus oferinte vivon por sia Lombardio.

* * *

LA SKRIBISTETO FLORENCA

Li estis en la kvara klaso de l' unuagrada lernejo: gracia Florencano dekdujara, kun nigraj haroj kaj vizaĝo blanka, la plej maljuna filo de fervojaroficisto, kiu, kun familio nombroriĉa kaj malgranda stipendio, vivadis mizere. Lia patro lin amis korege kaj estis bona, indulgema kun li: indulgema pri ĉio krom pri lerneja afero: tiurilate multon li pretendis kaj montriĝis severa, ĉar la filo devis iĝi kiel eble plej baldaŭ kapabla oficisto por helpi sian familion: kaj, tiacele, li devis multe penadi dum tempo mallonga. Kaj, kvankam la knabo studadis, la patro lin ĉiam instigis studadi. Jam maljuna estis la patro, kaj eĉ pli frue lin maljunigis la troa laboro. Tamen pro l' familia malriĉeco, krom la multa oficlaboro, li penadis preni sur sin kopiistaĵojn kaj tiel pasigis eĉ noktoparton ĉe l' skribotablo. Lastatempe li estis preninta sur sin de eldonista firmo, kiu publikigis po kajeroj ĵurnalojn kaj

librojn, la taskon skribi sur la banderoloj la adresojn de l' abonintoj: tiamaniere li gajnis tri frankojn po kvincent ĝuste kaj bele skribitaj banderoloj. Sed tia laboro lin lacigis kaj li plendis pri tio ĉe la familia vespermanĝo.

— Miaj okuloj malakriĝas; — li diris, — tiu nokta laboro min mortigas. — Paĉjo, lasu min labori anstataŭ vi: vi ja scias, ke mi skribas kiel vi tute egale. — Sed la patro respondis: — Ne, fileto mia; studi vi devas: via lernejo estas multe pli grava ol miaj banderoloj. Mia konscienco riproĉus min, se mi perdigus al vi unu horon. Mi dankas, sed mi ne volas ke vi eĉ parolu pri tio.

La knabo sciis, ke kun la patro estis vane insisti, kaj li ne insistis. Sed jen kion li faris. Li sciis, ke precize je noktomezo lia patro ĉesis skribadi kaj el sia skribejeto iris dormoĉambren. Jam li aŭdis lin: je la dekdua bato de l' pendolhorloĝo la bruo de seĝo movita kaj malrapidaj paŝoj aŭdiĝis. Ian nokton, la filo atendis ĝis kiam li kuŝiĝis; silente sin vestis, iris palpante en la skribejeton, reekbruligis la petrollampon kaj sidiĝis ĉe la skribotablo. Tie estis amaso da blankaj banderoloj kaj listo da adresoj:

perfekte imitante la patran skribmanieron, li ekkopiis ilin. Volonte, kontente kaj timetante skribadis li, kaj la banderoloj amasiĝis: de tempo al tempo la knabo demetis la plumon kaj frotis siajn manojn, por rekomenci tuj pli rapide, atentorele kaj ridetante. Cent sesdek banderolojn li skribis: unu frankon. Tiam li haltis, remetis la plumon kie li estis ĝin trovinta, estingis la lampon kaj reiris liten piedfingre.

Tiun tagon, tagmeze, la patro sidiĝis ĉe l' manĝotablo gajhumora. Li estis nenion eksciinta, ĉar tiun laboron li faradis meĥanike, ĝin kalkulante je horoj kaj dume pensante pri aliaj aferoj: la banderolojn li denombris morgaŭe. La patro sidiĝis gajhumora ĉe l' manĝotablo kaj frapetante la ŝultron de sia filo: — He Ĝuljo, — li diris — bona skribisto estas ankoraŭ via patro, mi vin certigas! Dum du horoj hieraŭ vespere, mi skribis trionon da banderoloj pli ol kutime. Mia mano estas ankoraŭ sufiĉe rapida kaj okuloj ne laciĝas. — Tiam Ĝuljo, kontenta kaj silenta, diris al si: « Kara paĉio, mi havigas al vi, krom la gajno, tian kontentigon, ke vi kredas esti juniĝinta. Nu, antaŭen! »

Kuraĝiĝinta pro tia sukceso, la morgaŭan

nokton li leviĝis ree kaj skribadis. Tiel li faris dum kelkaj noktoj, kaj lia patro nenion ekvidis. Nur iam, vespermanĝante, li ekkriis: — Strange, kiom da petrolo bruliĝas de post kelka tempo en tiu-ĉi domo! — Ĝuljo ektremis: sed la patro ne daŭrigis pri tio: kaj la nokta laboro daŭradis.

Malfeliĉe, interrompante tiel ĉiunokte sian dormadon, Ĝuljo ne ripozis sufiĉe: matene li leviĝis laca kaj vespere, skribante sian taskon, li penadis teni la okulojn malfermitaj. Iun vesperon — neniam antaŭe okazis tio dum lia vivo — li ekdormis sur sia kajero. He! He! — kriis la patro plaŭdante la manojn, — laboru, filo mia! — Ĝuljo skuiĝis kaj skribadis. Sed la morgaŭan kaj la postmorgaŭajn vesperojn okazis same, eĉ plie: li dormetis sur la libroj, leviĝis pli malfrue ol kutime, studis sian lecionon lacmaniere, lernadon ŝajnis li malami. Lia patro ekobservis lin, poste priokupiĝis, fine lin ekriproĉis. (Neniam estis deviĝinta tion fari!) — Ĝuljo — li diris ian matenon, — vi volas min trompi, vi ne estas plu la sama. Mi ne povas toleri tion. Vi scias, ke vi estas la espero de l' tuta familio. Mi ne estas kontenta pri vi. Ĉu vi komprenas? — Je tiu riproĉo — la unua tute severa, kiun

li ricevis — la malfeliĉa knabo maltrankviliĝis. « Ho! jes — li pensis — vere! tiel oni ne povas daŭrigi: la trompo devas fini ». Sed ĝuste tiun tagon, je vespermanĝo, la patro gaje diris: — Ĉu vi scias, ke mi dum tiu ĉi monato pligajnis tridek-du frankojn per banderolskribado?! — Kaj dume el tirkesto de l' tablo li eltiris bombonpakaĵon aĉetitan por festi la eksterordinaran gajnon kune kun siaj gefiloj, kiuj ĉiuj ekakceptis ĝin per manplaŭdado. Tiam Ĝuljo kuraĝiĝis kaj diris al si mem: « Ne, paĉjo mia, mi ne ĉesos vin trompi; mi plimulte penados por studi dum la tago; sed nokte mi laborados por vi kaj por la aliaj ». Sed la patro aldonis:

— Tridek-du frankojn plue! Mi estas kontenta. Sed estas tiu, — li montris Ĝuljon, — kiu min dolorigas. — Ĝuljo reenpelis silente du larmojn, kiuj estis elfluantaj pro l' riproĉo, sed li sentis samtempe grandan dolĉecon en la koro.

Kaj li daŭradis laboregi. Sed laciĝo superamasiĝis, kaj estis ĉiam pli malfacile toleri ĝin. La afero daŭris de post du monatoj. La patro riproĉadis la filon kaj rigardadis lin kolerokule. Iun tagon li iris peti informojn de lia instruisto, kiu diris: — Jes, li lernas, ĉar li

estas inteligenta. Sed li ne estas bonvola kiel antaŭe. Li dormetas, li oscedas, li distriĝas. Li skribas mallongajn taskojn, rapide, per malbela skribado. Ho! li povus multe pli fari ol nun!... — Tiun vesperon la patro apartigis la filon kaj riproĉis lin pli grave ol ĉiam: — Ĝuljo, vi vidas, mi eluzas miajn fortojn por la familio. Vi ne min kunhelpas. Vi ne havas bonan koron por mi nek por viaj fratoj nek por via patrino! — Ha ne! Ne diru tion, paĉjo! — kriis la filo ekploregante, kaj li malfermis la buŝon por konfesi ĉion. Sed la patro interrompis lin. — Vi ja scias la familian staton; vi ja scias, ke estas necese bonvolo kaj sinoferoj de ĉiuj. Mi mem, vi tion vidas, devus duobligi mian penadon. Tiun-ĉi monaton mi esperis ricevi gratifikacion je cent frankoj de la Fervojaro, kaj hodiaŭ matene mi sciiĝis, ke mi nenion ricevos! — Tiam Ĝuljo reenpelis tuj sian konfeson, kaj diris al si decidanime: — Ne, paĉjo, mi diros al vi nenion; mi gardos la sekreton por labori por vi; doloron vian mi kompensas per gajno; pri la lernejo mi ĉiam studados sufiĉe por superi la ekzamenojn; tio, kio gravas, estas kunhelpi vin gajni la vivon kaj malpezigi al vi penadon, kiu vin mortigas.

Kaj li daŭrigis kaj pasis du aliaj monatoj je dumnokta laboro kaj laceco dumtaga, je egaj penadoj flanke de l' filo, je riproĉoj maldolĉaj flanke de l' patro. Sed, plej bedaŭrinde, tiu ĉi ĉiutage plimalvarmiĝis kontraŭ sia filo, kun kiu nur malofte parolis, kiel se li estus iĝinta sentaŭgulo, de kiu oni povis esperi nenion, kaj eĉ evitis renkonti rigardon lian. Tion ekvidis Ĝuljo kaj malgajiĝis; kaj, kiam lia patro turnis al li la dorson, kaŝe ĵetis al li kison, antaŭenigante la kapon kun kompata kaj melankolia dolĉeco. Plie iom pro doloro, iom pro penado, ĉiutage li malgrasiĝis kaj senkoloriĝis, devigata ĉiam malplizorgi siajn studojn. Li ja komprenis, ke tio ne povis daŭradi kaj ĉiuvespere li decidis: — Tiun-ĉi nokton mi ne leviĝos plu; — sed je l' sono de noktomezo, ĝuste kiam li devis energie efektivigi sian decidon, li sentis konsciencoriproĉon: ŝajnis al li, ke, se li restus en la lito, li malŝatus devon, li ŝtelus frankon al sia patro kaj al sia familio. Li do leviĝis pensante, ke ian nokton lia patro vekiĝos kaj surprizos lin, aŭ ekvidos la trompon per duobla denombrado de l' banderoloj: kaj tiam kompreneble ĉio finos ne pro lia volo, ĉar li ne estas kapabla voli tion.

Sed iam, vespermanĝante, la patro eldiris parolon, kiu estis decida por li. Lin estis rigardinta patrino lia, kiu trovis lin pli malbonfarta kaj pala ol kutime, kaj ekkriis: — Vi malsanas, Ĝuljo! — kaj, sin turnante al la patro, maltrankvile ŝi diris: — Ĝuljo malsanas. Rigardu kiel li estas pala. Ĝuljo mia, kion vi sentas? — La patro ĵetis sur lin rapidan rigardon kaj diris: — Malbona konscienco kaŭzas farton malbonan. Li ne estis tiel, kiam li estis studema knabo kaj filo amema. — Sed li malsanas! — ekkriis la patrino. — Mi estas indiferenta! — respondis la patro.

Tiu parolo estis kiel tranĉilfrapo je l' koro de la malfeliĉa knabo. Ha! Li estis indiferenta. Lia patro, kiu ektremis iam, se nur aŭdis lin tuseti! Lin ne plu amis, do, la patro! sendube li estis mortinta en lia koro... Ha ne, patro mia, — diris al si la knabo dolorege — nun ĝi vere devas fini: sen amo via mi ne povas vivi, mi tute ĝin volas; mi diros al vi ĉion; mi vin ne trompos plu, mi studos kiel antaŭe: nenion mi preterlasos, se nur vi min amos, kara paĉjo mia! Ho, tiun fojon mi estas certa pri mia decido!

Tamen ankaŭ tiun nokton li leviĝis, pro

kutimo pli ol ial ajn; kaj leviĝinta li volis iri saluti, revidi dum kelkaj minutoj, en noktosilento, lastafoje, tiun ĉambreton, kie li tiel multe kaŝelaboradis, kun la koro plena je kontenteco kaj je dolĉeco. Poste, kiam li denove troviĝis ĉe la skribotablo, kun ekbruligita lampo, kaj vidis tiujn blankajn banderolojn, kie neniam plu li estos skribonta urbo- kaj personomojn, li melankoliiĝis kaj vivece reprenis la plumon, por komenci la kutiman laboron: sed, etendante manon, li ekpuŝis libron, kiu falis. Lia sango ekfluegis. Se lia patro vekiĝus! Certe li ne surprizus lin en ia malbonaĵo, ĉar li mem jam decidis konfesi ĉion; tamen... aŭdi tium paŝon alproksimiĝi en la mallumo; — surpriziĝi tiu hore, tiasilente; — lia patrino, kiu vekiĝus kaj maltrankviliĝus; — kaj unuafoje la penso, ke lia patro eble estus humiliĝonta antaŭ li ekvidante ĉion... — ĉio tio lin kvazaŭ timigis. Li streĉis la orelon, eĉ senspirade... Bruon li ne aŭdis. Li orelumis ĉe l' pordo, kiu estis malantaŭ liaj ŝultroj: nenion. En la tuta domo oni dormadis. Lia patro ne estis aŭdinta. Li trankviliĝis kaj ree ekskribadis: la banderoloj amasiĝadis. Li estis aŭdanta la kadencan paŝon de

l' policanoj en la strato dezerta, poste veturil-bruadon, kiu ĉesis subite; post kelka tempo bruadon de ŝarĝoveturiloj, kiuj traveturis mal-rapide; fine profundan silenton, nur malofte interrompatan per bojado de malproksima hundo. Li ĉiam skribadis. Kaj dume, malantaŭ li estis lia patro. Aŭdinte la librofalon, tiu-ĉi leviĝis kaj estis atendinta la oportunan momenton: liaj paŝoj kaj la knaro de l' pordo ne aŭdiĝis pro la bruado de l' ŝarĝoveturiloj; kaj tie li estis, — kun sia blanka kapo super la kapeto nigra de Ĝuljo, — vidante la plumon moviĝadi sur la banderoloj: — unumomente li ĉion divenis, ĉion memoris, ĉion komprenis kaj senespera pento, senlima amemo enpenetris animon lian kaj tenis lin najlitan, sufokitan tie, malantaŭ lia fileto. Subite Ĝuljo elmetis laŭtan krion, — du konvulsiaj manoj estis premantaj lian kapon. — Ho paĉjo! paĉjo, pardonu! — li kriis; reko-ninte sian patron je l' plorado. — Pardonu vi! — respondis la patro singulte kaj kovrante lian frunton per kisoj, — mi ĉion komprenis, mi ĉion scias, mi estas, kiu de vi petas pardonon, sankta krejtaĵo mia! Venu kune, venu! — kaj li lin alpuŝis aŭ, pliverdire, alportis ĉe la liton

de la panjo vekiĝinta, inter kies brakojn ĵetis lin dirante: — Kisu tiun anĝelan filon, kiu post tri monatoj, ne dormas kaj laboras por mi, dume mi dolorigas lian koron, lin, kiu gajnas por ni la panon! — La patrino ĉirkaŭpremadis lin malhelpata paroli; poste ŝi diris: — Iru dormi tuj, fileto mia, iru ripozi! Portu lin liten! — La patro prenis lin sur siaj brakoj, portis lin en lian ĉambron, kuŝigis lin liten, ĉiam spiregante kaj lin karesante, aranĝante kusenojn kaj littukojn. — Danke, paĉjo — ripetadis la filo, — danke: sed vi iru liten nun; mi estas kontenta; iru liten, paĉjo. — Sed lia patro volis vidi lin ekdormintan; li sidiĝis ĉe l' lito, prenis lian manon kaj diris al li: — Dormu, dormu, filo mia! — Kaj Ĝuljo, senfortiĝinta, fine ekdormis, kaj dormadis multajn horojn, ĝuante unufoje post kelkaj monatoj trankvilan dormadon ĝojigitan per sonĝoj ridantaj. Kiam fine li malfermis la okulojn (jam de longe brilis la suno), li ektuŝis kaj poste ekvidis ĉe sia brusto, apogitan je l' litbordo, la blankan kapon de sia patro, kiu tiel estis pasiginta la nokton, kaj ankoraŭ dormadis kun la frunto sur lia koro.

* * *

LA SARDINIA TAMBURISTETO

Dum la unua tago de l' batalo ĉe Custoza (elp. Kustoca), la 24an de Julio 1848, sesdeko da soldatoj de unu el niaj infanteriaj regimentoj estis sendataj okupi solestaran domon sur altaĵo. Sed tie ilin atakis neatendite du aŭstraj rotoj, kiuj per pafhajlado el diversaj flankoj lasis al ili la nuran tempon rifuĝi en la domon kaj rapidege bari la pordojn, ne zorgante pri kelkaj mortintoj kaj vunditoj, kiuj restis tra la kampoj. Barinte la pordojn niaj soldatoj rapidegis al la fenestroj de l' ter- kaj de l' unua etaĝo, por dense ekkontraŭpafadi la atakantojn, kiuj iom post iom alproksimiĝis duonronde, ĉiam pafante. La sesdek italajn soldatojn komandis du oficiroj kaj kapitano, alta maljunulo, malgrasa kaj rigida, kun haroj kaj lipharoj blankaj. Ankaŭ estis sardinia tamburisteto dekkvarjara, kiu ŝajnis apenaŭ dekdujara, laŭ la staturo, kun olivkolora vizaĝo kaj profundaj okuloj nigre

briletaj. La kapitano el unuaetaĝa ĉambro direktis la defendon per komandoj, kiuj ŝajnis pistolpafoj: sur lia vizaĝo fersimila nenia signo de maltrankvilo elvidiĝis. La tamburisteto, iomete pala, sed firmestara sur siaj kruroj, supreniris tablon, kie, longigante sian kolon kaj restante ĉe l' muro, rigardis tra la fenestroj eksteren; meze de l' fumo, tra la kampoj, li vidis la blankajn uniformojn de l' Aŭstroj, kiuj malrapide antaŭeniĝis. La deklivo, sur kiu staris la domo, unuaflanke estis kruta kaj tien malfermiĝis nur fenestreto de subtegmenta ejo; tiuflanke, do, ne minacis la Aŭstroj kaj la krutaĵo estis senhoma. Nur oni pafis kontraŭ la fasado kaj la du flankoj.

Sed ĝi estis infera pafado, hajlado de plumbaj kugloj, kiu ekstere fendetis la murojn kaj disrompis la tegolojn, interne frakasis plafonojn, meblojn, fenestrajn kadrojn, suprenĵetante lignosplitojn, morteraĵnubojn, potpecojn kaj vetraĵojn, fajfante, saltetante, ĉion rompegante tiel brue, ke la oreloj disfendiĝis. Iam post iam mortfalis mallantaŭen la soldatoj, kiuj pafadis ĉe l' fenestroj, kaj oni portis ilin flanken. Iuj ŝanceliĝis de unu al alia ĉambro manpremante siajn vundojn. En la kuirejo jam estis unu

mortinto, kun disfendita frunto. La duonrondo de l' malamikoj mallarĝiĝis.

Iumomente la kapitano, ĝis tiam senmova, maltrankviliĝis kaj rapide eliris la ĉambron akompanata de serĝento. Post tri minutoj la serĝento revenis, vokis la tamburisteton kaj komandis lin sekvi. La knabo sekvis lin suprenkurante lignoŝtuparon kaj kune enirante subtegmenton senmeblan.

Tie staris ĉe l' fenestreto la kapitano skribante paperfolion per krajono kaj je liaj piedoj kuŝis putoŝnuro.

La kapitano faldis la folion kaj, fikse rigardante la knabon per siaj grizaj kaj malvarmaj pupiloj, kiuj tremigis la soldatojn:

— Tamburisteto! — li diris severece.

La tamburisteto metis manon je l' viziero.

La kapitano daŭrigis:

— Vi havas kuraĝon.

La okuloj de l' knabo brilumis.

— Jes, sinjoro kapitano, — li respondis.

— Rigardu tien — diris la kapitano lin puŝante ĉe l' fenestreton, — en la ebenaĵon, proksime de Villafranka, kie estas brilumo de bajonetoj. Tie staras la niaj. Prenu tiun-ĉi folieton,